1428/1

# REGULARO

DE LA

# ESPERANTO INSTITUTO "HARMONIO"




FONDITA 1915

1 WEST 34-a STRATO
NOV JORKO, USONO

## LA DIREKTORARO 1920:

| | |
|---|---|
| PREZIDANTO - - - | J. J. SUSSMUTH |
| SUBPREZIDANTO - | CATHERINE M. HEALY |
| FINANCISTO - - - - | D. A, KLAJIN |
| SEKRETARIO - - | DELLA C. LINCOLN |
| SUBSEKRETARIO - - - - | J. M. MAURY |

★

BIBLIOTECA FASCE/
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

## NOMO, SIDEJO KAJ CELO.

1. La nomo de la societo estas "ESPERANTO INSTITUTO HARMONIO."

2. Ĝia centra sidejo estas en la urbo Nov Jorko, Ŝtato de New York, Usono.

3. Ĝia celo estas disvastigi Esperanton en la loko mem, per agrablaj sociaj aferoj, precipe per fondado de lernejoj, de kanthoroj, teatraĵoj, operoj, presaĵoj de revuoj, poemoj kaj kantoj, k. t. p.

4. Ĝia cetera celo estas anigi Esperantistojn senrigarde al ilia pensmaniero, aĝo, nacieco aŭ raso por plifaciligi al ili, la uzadon de nia lingvo parole, interkoresponde aŭ je interŝanĝo de kolektaĵoj kaj ideoj. Per tio nia instituto estas la perilo de veraj gesamideanoj!

5. Ĝi ankaŭ celadas plifaciligi la vojaĝadon de la geanoj, per starigo de propraj gekonsuloj ĉie ajn tra la mondo, kies devo estos starigi samosociajn institutojn en sia loko. La grava tasko de Harmonio estas starigi vojaĝontajn operstaĝionojn.

## ANIĜO.

6. Ĉiu persono kiu povas skribi Esperante, senrigarde al sia okupo, povas aniĝi, se kontenta kun tiu ĉi regularo.

## KOTIZAĴO.

7. La jara kotizaĵo estas laŭplaĉa, sed por la Usonanoj kaj Kanadanoj neniam malpli ol unu dolaro pojare, dum por ĉiuj eksterlandanoj ne ekzistas iu ajn pagebla kotizaĵo.

## RAJTOJ.

8. Ĉiu membro rajtas:

a) laŭplaĉe elekti korespondfakon;

b) laŭplaĉe korespondadi kun iu ajn membro sed nur pri la punkto lin aŭ ŝin interesanta;

c) ricevi la oficialan gazeton; (se li pagis kotizaĵon).

d) plendi se ne ricevis respondon dum kvar monatoj de sia elektita korespondanto.

## DEVOJ.

9. Ĉiu membro

a) devas respondi al sia korespondanto dum almenaŭ tri monatoj, se la korespondaĵo koncernas la elektitan punkton;

b) devas atenti la cifrojn de la ŝlosilo de la membro, kun kiu li deziras korespondadi, kaj ne enui la elektiton kun alia korespondaĵo!

c) skribi ĉiam la adresojn korekte kaj legeble, same la leterojn;

d) estas petata varbi pluajn geanojn kaj skribi al la sekretario ĉu li havas plurajn ideojn por plibonigo de la Harmonio.

## ORGANIZO.

10. HARMONIO konsistas el anaro, direktoraro, komitataro kaj konsularo.

11. La Direktoraro konsistas el Prezidanto, Subprezidanto, Financisto, Sekretario kaj Subsekretario, plue el diversaj komitatoj, kiuj ŝajnas necesaj por la afero.

12. La devo de la Prezidanto estas reprezenti la societon aŭ publike aŭ ĉeaŭtoritate, la devo de Subprezidanto estas anstataŭigi la prezidanton en kazo de lia neebleco kaj gardi la aferojn de la societo precipe por plibonigo kaj kreskigo. La devo de Financisto estas kolekti la kotizaĵojn kaj donacojn kaj gardi bone, prila elspezoj, precipe ke tiaj ne supreniru la enspezojn! Li devas doni korektan raporton pri la stato de la kaso, k. t. p. koncerne la havaĵon de la societo. La Sekretario devas dissendadi la invitojn al

la aranĝadoj de la societo kaj gardi pri la pligrandigo de la geanaro. La Subsekretario devas helpi precipe al la Sekretario kaj Financisto en la aferoj, eksteraj, kiuj devas esti faritaj skribe. La Komitatoj estas starigitaj por diversaj celoj kiel por presado, instuado, amuzado, atendado de alvenontoj, vizitado de malsanuloj, kantado, teatrado, k. t. p. Ili konsistas el prezidanto kaj sekretario kaj se eble tri anoj. Ĉiuj raportoj de agoj devas esti publikigitaj aŭ ĉe la Barĉo, okazanta ĉiun monaton krom la du somermonatoj: Julio kaj Aŭgusto, aŭ ĉe aliaj kunvenoj de la societo.

13. La devo de la konsulo estas akcepti alvenontajn gesamideanojn en sia loko, klarigante al ili, kie ili povas ricevi atentadon homvaloran ,sen fali en la manoj de ekspluatantoj. Doni al ili, veran respondon, kie trovi tion, kion ili deziras vidi aŭ renkonti en la loko aŭ lando. La konsulo devas esti persono tolerema al ĉiu ajn ideo, ĉar en Esperantujo troviĝas personoj el ĉiuj opinioj, kiuj serĉas siajn precipajn renkontejojn al kiuj li ilin devas direktigi, sen intermikso kontraŭonta al la pensmaniero de la vojaĝanto! Toleremo estas la unua devo de ĉiu Esperantisto, ĝi estas lia vera religio!

La konsulo plue penu imiti la nian instituton en sia loko, kaj lia sukceso estos ne nur ankaŭ la nia, sed tiu de la Esperantismo.

## DIVERSAĴOJ.

14. Harmonio deziras ke ĉiu membro portu la Esperantistan verdsteleton, kaj ĉe vojaĝado tiamaniere renkontu kaj konatiĝu kun aliaj gesamideanoj.

15. Ĉiu membro ricevas varbilojn por anigi plurajn personojn. En Usono estas necese ankaŭ varbi neesperantistojn, por ke ni havu monon por eldonado de presaĵoj, k. t. p.

16. La Barĉoj devas okazi ĉiun monaton almenaŭ unufoje la vesperon, krom Julio kaj Aŭgusto, sed en Julio kaj Aŭgusto devas okazi ekskursfestoj. Ili estas aranĝataj pro la kunvenoj de la funkciantoj kaj geanoj. Lernejoj kaj prelegoj devas okazi dum la vintraj monatoj tute regule. La lernejoj povas esti komencaj kaj altaj, kaj per prelegoj oni povas fondi Popolan Universitaton.

Paroladoj publikaj, koncertoj, baloj, teatraĵoj k. ceteraj amuzaĵoj estu preparotaj laŭokaze.

## ŜLOSILO.

### I. KLASO.

A Metu la poŝtmarkon bildflanke.
B Sendu vidaĵojn de via loko.
C Sendu vidaĵojn de iu ajn loko.
Ĉ Sendu nur bildojn de arto.
D Sendu bildojn de geaktoroj.
E Sendu bildojn de famaj homoj.
F Sendu bildojn de historiaĵoj.
G Sendu bildojn de naciaj vestaĵoj.
Ĝ Sendu kartojn kun kanto.

### II. KLASO.

Mi kolektas:

I. Poŝtmarkojn.
II. Gazetojn Esperantajn.
III. Fotografaĵojn.
IV. Monerojn.
V. Mineralojn.
VI. Plantojn.
VII. Papiliojn.
VIII. Antikvajn librojn.
IX. Insektojn.
X. Insignojn Esperantajn.
XI. Insignojn ekspoziciajn.
XII. Insignojn politikemajn.
XIII. Insignojn homhelpemajn.
XIV. Insignojn alispecajn.
XV. Memorigmonerojn.
XVI. Meblojn antikvajn.
XVII. Librojn Esperantistajn.
XVIII. Librojn nacilingvajn.
XIX. Bildojn.
XX. Pentraĵojn.
XXI. Brodaĵojn.
XXII. Muzikilojn.
XXIII. Kantaĵojn.
XXIV. Proverbojn.
XXV. Sigelmarkojn Esperantajn.
XXVI. Sigelmarkojn aliajn.

### III. KLASO.

Mi deziras korespondadi nur pri:

1. Aferoj lingvaj:
   a) Esperanto
   b) nacia lingvo
   c) antikva lingvo
   d) Esperanto kiel lerneja fako
2. Aferoj Komercaj.
3. Aferoj Laboristaj.
4. Aferoj Maraj.
5. Aferoj Militismaj.
6. Aferoj Kontraŭmilitismaj.

7. Aferoj Politikaj.
8. Aferoj religiaj:
   a) Teozofio
   b) Bahaaj instruoj
   c) Katolikismo
   d) Protestantismo
   e) Hebreismo
   f) Zionismo
   g) Mohamedismo
   h) Mormonismo
   i) Panteismo
   j) Politeismo
   k) aliaj religiaj skoloj
   l) Spiritismo.
9. Aferoj kontraŭreligiaj.
10. Aferoj sociaj.
11. Aferoj teĥnikaj.
12. Abelkulturado.
13. Aeronaŭtiko.
14. Agrikulturo.
15. Agronomio.
16. Amikema korespondaĵo.
17. Anarĥiismo.
18. Animaloj.
19. Arĥeologio.
20. Arĥitekturo.
21. Arto:
   a) pentra
   b) skulpta
   c) muzika
   d) voĉa
22. Astronomio.
23. Aŭtomobilismo.
24. Bestkulturado.
25. Birdkulturado.
26. Bolŝevismo.
27. Dancoj.
28. Demokratismo.
29. Ekspozicioj.
30. Filologio.
31. Filozofio.
32. Fiziko.
33. Gimnastiko.
34. Historio.
35. Homaranismo.
36. Ĥemio.
37. Ĥirurgio:
   a) ĝenerala
   b) militara
   c) kontraŭ-akcidenta.
38. Ĥoro:
   a) Esperantista loka
   b) Esperantista vojaĝanta
   c) nacia, preta por kanti Esperante, loka
   d) sama, sed vojaĝanta.
39. Individuismo.
40. Industrio.

BIBLIOTEC
SARTORIO

41. Juro.

42. Kantoj:

a) naciaj
b) Esperantistaj.

43. Kontraŭalkoholismo.

44. Kontraŭnikotenismo.

54. Kontraŭvakcio.

46. Kontraŭvivisekcio.

47. Kristana misio:

a) protestanta
b) katolika.
c) mormona
d) greko-orienta
e) greko-katolika.

48. Kutimoj kaj moroj.

49. Literaturo.

50. Ludoj.

50. Matematiko.

52. Medicino:

a) alopatia
b) homeopatia
c) hidra-fizika
d) osteopatia
e) alia senvenena.

53. Mineralogio.

54. Modo.

55. Muziko.

56. Operoj.

57. Operetoj.

58. Pedagogio.

59. Plejmultismo.

60. Poŝtmarkoj.

61. Psiĥologio.

62. Ruĝa Kruco, Samaritanismo kaj homflegado.

63. Sindikalismo.

64. Socialismo.

65. Solimpostismo.

66. Stenografio.

67. Ŝakludo.

68. Teatraĵoj.

69. Teologio.

70. Turismo.


71. Vegetaĵoj.

72. Vegetarismo.

73. Vedantismo.

74. Virina egaliga movado.

75. Zoologio.



ESPERANTO PRINTERS
Fellowship Press Service, 31 St. Marks Place, New York City

ESPERANTO INSTITUTE HARMONIO

New York, ____________ 192

I wish to become a member of your society and send herewith ONE DOLLAR for its support.

NAME ..............................

STREET ..............................

TOWN ..............................

STATE ..............................

## AL LA ESPERANTO INSTITUTO HARMONIO

New York, Usono.

Mi deziras esti via membro, promesante laboradi laŭ via regularo, kiun mi trastudis.

Nomo: (S—ro, S—ino, F—ino) ..............................................

Adreso ..............................................

Loĝloko kai lando ..............................................

Aĝo (se pli juna ol 20 jaroj) ..............................................

Mi elektis la sekvantajn signojn el ŝlosilo:

I. Klaso ..............................................

II. Klaso ..............................................

III. Klaso ..............................................